
LA PRINTEMPA KAMPARO.
KAJ ŜIA DOLĈA KANTADO DUM ŜI PLEKTAS FLORKRONOJN...
TIUJ AFEROJ DEVUS ESTI GRANDA ĜOJO POR MI, SED BEDAŬRINDE...
LA VORTOJ DE RAVELIN PREMAS AL MI LA KORON.
ILI ESTAS KIEL NIGRA NEBULO RESONANTA EN MI.
VI ASPEKTAS SIMILA AL NIA PATRO. TIAL ŜI ŜAJNE AMAS VIN, FRATO.
NU, JES. KIAM MI UNUAFOJE RENKONTIS ŜIN EN LA SUBTERA ARBARO...
LA RIGARDO DE MIKAELINO ESTIS NOSTALGIA, KAJ ŜI FIKSIS ŜIAJN OKULOJN AL MI, KVAZAŬ MIA ĈEESTO ĜOJIGIS ŜIN.
ĈU EBLAS, KE ŜI JA VIDAS GUSTAVON EN MI?


NE...
MI FIDU NUR ŜIAN NUNAN RIGARDON. NUR TION, NUR TION!
MI PENSU PRI NENIO TIA! MI DUBU PRI NENIO!
ĈU MI RAJTAS SURIRI LA BOATON?
STEFA-NINO...
EN ORDO... VI ESTAS TRE MAL-AFABLA, ĈU NE?
NE!
LA VETERO ESTAS TRE BONA HO-DIAŬ... ĈU VI PER-MESAS AL MI SURIRI, DO?


ŜI JA SCIAS KIEL FLATI MIN! MIA PATRO KAJ MI FARIS GRAVAN ESPLORON.
NU, VI KAJ VIA PATRO ESTAS TRE IMPERTINENTAJ LASTATEMPE.
LAŬRA DIRIS, KE VI NE PLU LABORAS.
JES... ĈU VI NE VOLAS AŬDI PRI MIKAELINO?
KI... KIO?!
KIEL MI ATENDIS! KIAM ONI DIRAS ŜIAN NOMON, VI TUJ NERVOZIĜAS.
ĈU VI VOLAS EKSCII PRI TIO?
NE, MI VOLAS ESTI SOLA... BONVOLU FORIRI.
HO, ĈU VI NE INTERESIĜAS PRI MIAJ ELTROVAĴOJ, RAVELIN?
EKZEMPLE: KIE NASKIĜIS MIKAELINO?
AU KIUJ ESTAS ŜIAJ GEPATROJ?
ĈU VI ESPLORIS PRI ŜI?!
NE FARU ION TIAN DENOVE!


...
EN ORDO... TAMEN, LA TUTA AFERO KONCERNAS VIN KAJ JOHANON.
KIO OKAZAS? ĈU VI DO NE VOLAS AŬSKULTI?
MI VOLAS AŬDI NENION, KION VI DIROS.
ムッ……
MI DIROS LA JENON!
MIKAELINO ESTAS VIA FRATINO.
KION... KION VI DIRIS?!
MI NE PERMESOS, KE VI DIRU TIUJN STRANGAĴOJN!



VI ESTAS TIOM SURPRIZITA, KE VI NE POVAS ELGORĜIGI EĈ UNU SONON!
KION VI DIRAS?!
MIKAELINO ESTAS LA FILINO DE GUSTAVO J. LANTOO KAJ VIRINO MALBONREPUTACIA.
MI POVAS RIPETI TION TIOM DA FOJOJ, KIOM VI VOLOS!
MIKAELINO ESTAS VIA FRATINO! LA PLI JUNA FRATINO DE JOHANO KAJ VI!
MI HAVAS PRUVOJN, KIUJ KONFIRMAS TION. LA ESPLORO FARE DE MIA PATRO ESTIS JA FRUKTODONA!
TIO ESTAS MALVERA!
VI NUR MENSOGAS!
SE VI NE KREDAS MIN, PAROLU KUN VAGA PENTRISTO, KIU NOMIĜAS HINDLO.


FORPAFIĜU, MENSOGEMA HARPIO!
SE VI RESTAS ĈI TIE, VI BEDAŬROS TION!
VI TRI MERITAS LA PLEJ EGAN SUFERON!
VI KAJ JOHANO ESTAS MALBENITAJ!
IRU INFEREN.
TIO ESTAS MENSOGO...
TIO ESTAS MENSOGO...
MIKAELINO ESTAS FILINO DE MIA PATRO...
KAJ JOHANO ENAMIĜIS AL ŜI... TAMEN ILI ESTAS GEFRATOJ!



TIO ESTAS GRANDA MEN-SOGO!
BREMS
JES, JES.
ĈU VI ESTAS... MIKAE-LINO?


ĈIUOKAZE, JUNAJ INOJ ESTU TRE SINGARDAJ PRI VIROJ...
STRANGA VIRO! LI NE-NION DIRIS. LI RIGARDIS VIAN VIZAĜON KAJ FORIRIS... ĈU VI KONAS LIN, KARA?
NE...
VRRRM
KIO OKAZAS NUN?
KIO ESTAS TIO?
TOMBOJ, ĈU VI NE VIDAS?
TOM-BOJ?
SUB TOMBO-ŜTONOJ RIPOZAS MORTINTOJ. ĈU VI NE SCIIS TION?
MI NE SCIIS PRI LA EK-ZISTO DE TIA AFERO!
MI VOLAS VIZITI LA LOKON, KIE GUSTAVO RIPOZAS. AL AL MI PLA-ĈUS IRI TIEN.
VI VOLAS VIZITI LA TOMBON DE MIA PATRO, ĈU?
NU, KIAL VI DIRAS TION NUN? TRE SUBITA PETO!


MIKAELINO, KIAL VI TIOM ZORGAS PRI GUSTAVO... PRI MIA PATRO?!
KAJ KIAL NE?
MI VOLAS IRI NUR UNUFOJE, BONVOLU!
NU, MI... MI SCIVOLAS ĈU LIA TOMBO ESTAS ORNAMITA PER FLOROJ, SAME KIEL LA TOMBOJ DE ĈIUJ ALIAJ.
HMM... ĜI NE ESTAS ORNAMITA.
KIAL ONI DEKORACIUS IES TOMBON?
JOHANO, MI KOMPATAS LIN! VE!
JOHANO, KIO MISAS? VI MIN TIMIGAS!
MI DEMANDIS: ĈU TIO ESTAS LA SOLA KIALO?!
ĈU TIO ESTAS LA SOLA KIALO?
NU, LI PRIZORGIS MIN DUM MULTE DA TEMPO...
KAJ VI AMAS MIN ĈAR MI ASPEKTAS KIEL LI!
VI AMIS GUSTAVON, ĈU NE?


JOHANO, KIO MISAS?
TIO ESTAS TERURAÎO!
VI ERARAS! VI ESTAS VI, KAJ GUSTAVO ESTAS GUSTAVO!
KIAL VI DIRAS ION TIEL MALĜOJIGAN?
ION TIEL MALGOJIGAN!
PARDONU MIN, MIKAELINO...
FOFJOJE MI MALTRANKVILIĜAS. MI NE POVAS EVITI TION.
MI SENTAS, KE NEVIDEBLA NEBULO KRESKAS ĈIRKAŬ NI, IOM POST IOM.
LA NEBULO PROVAS APARTIGI NIN.
VI SENDUBE ESTAS ĈI TIE.
MI NE PRIDUBAS VIAN VARMON. ĜI ESTAS IO CERTA.
NI FUĜU EL ĈI TIU BIENO, MIKAELINO!


SE NI DAŬRIGAS ĈI TION, ĈIUJ VUNDIĜOS, EĈ NI!
NIA AMO VUNDIS MIAN FRATON JAM.
KAJ EN ĈI TIU BIENO, NI NE POVOS ESKAPI EL LA OMBRO DE GUSTAVO.
SINJORO EMILO LOĜAS EN HELSINKO. LI ADMINISTRAS LA HEREDAĴON DE LA FAMILIO LANTOO.
NI PETU LIN PRI KONSILOJ POR KOMENCI NOVAN VIVON! NUR VI KAJ MI!
ĈU VI VOLAS ESKAPI KUN MI, MIKAELINO?
JES, JOHANO.
MI IRUS IEN AJN KUN VI!


ĈU VI FORGESIS ION?
NE!
ATENDU!
EK!
RAVELIN?!
ATENDU KAJ AÜSKULTU MIN!!
VI DU... VI DU NE DEVAS ESTI PARO!
NE!


RAVELIN, NE GRAVAS TIO, KION VI DIROS. NI FORIROS TUTEGALE.
NI KOMEN-COS NOVAN VIVON KUNE.
NE FARU TION.
VI NE RAJTAS AMI MIKAE-LINON!
TIO ESTAS MALPERME-SATA POR TIAJ HOMOJ, KIAJ NI ESTAS!
«MAL-PERME-SATA»?
KION SIGNIFAS TIO?


JOHANO... MIKAELINO ESTAS NIA...
NIA FRA-TINO.
MIKAELINO ESTAS NIA PLI JUNA FRATINO!



KIO?! RAVELIN...
N-NIA FRATINO...
MIKAELINO ESTAS NIA PLI JUNA FRATINO.
TIO ESTAS MENSOGO! VI MENSOGAS!
JES, NUR MENSOGO! VI DIRAS SENSENCAĴOJN! ESTAS NETOLEREBLE!
VI... VOLAS APARTIGI MIN DE ŜI! TIAL VI NUN DIRAS TIUN FRENEZAN RAKONTON.




MIKAELINO ESTAS LA FRUKTO DE KAŜITA AMRILATO DE PAĈJO KUN IU VIRINO.
STEFANINO DIRIS TION AL MI.
STEFANINO! ĈU VI VERE KREDAS LA VORTOJN DE TIA HOMO?!
SED, FRATO...
NE, VI ERARAS, FRATO.
JA ESTIS MOMENTOJ EN KIUJ MI SENTIS ĴALUZON, SED VI ERARAS.
TIUJ VORTOJ STRANGE PENETRIS EN MIAN KORON.
MI NE SCIAS KIAL, SED MI KREDAS ŜIN ĈI-FOJE.
ĈU ŜI VERE ESTAS MIA PLI JUNA FRATINO?
MIA PLI JUNA FRATINO...




MI NE KREDOS TION!
DIABLO FORPORTU TIUN KLAĈEMAN INON!
MI IROS DEMANDI ŜIN PRI TIO!
TIO SIGNIFAS, KE GUSTAVO ESTAS MIA PATRO...
KIEL TIO EBLAS?
MALFERMU LA PORDON!!
BUM
BUM
FRAP
FRAP
VEKIĜU! STEFANINO, BIREO!
MI ESTAS JOHANO! MALFERMU!
KIO DIABLE OKAZAS? ESTAS FRUMATENE!
EN ORDO, MI MALFERMOS LA PORDON! VI ROMPOS ĜIN, ĈU VI KONSCIAS PRI TIO?
BUM
BUM


HIK!
JOHANO...! ĈU VI VOLAS, KE MI AKOMPANU VIN AL IU LOKO, TIOM FRUE?
VI ESTAS ELEGANTE VESTITA. KIEN VI VOLAS IRI, DO?
AŬ... ĈU VI VENIS ĈI TIEN POR PETI, KE MI ESTU VIA FIANĈINO? MIA KARA PRINCO!
NE ŜAJNIGU VIN STULTA!
FRAP
KION... KION VI FARIS?


KIO OKAZIS, STEFANINO?
PAĈJO, JOHANO FRAPIS...
JOHANO VANGOFRAPIS MIN!
SINJORETO, MI NENIEL TOLEROS TION, KE VI KURAĜIS FRAPI MIAN FILINON!
EVIDENTE MI DEVIS VANGOFRAPI ŜIN! ŜI DIRIS MULTAJN FIAĴOJN AL RAVELIN!
KAJ... KION MI EKZAKTE DIRIS AL LI?
NE AGU NAIVE NUN!
HOOO! VI PAROLAS PRI TIO, KE MIKAELINO ESTAS VIA FRATINO.
NE DIRU TION PLU!
SE VI VOLAS FRAPI MIN, FARU TION LAŬVOLE.
KIAL ESTUS MALBONE DIRI, KE VIA FRATINO ESTAS VIA FRATINO? MI DIRAS VERON!


ESTAS TERURE, KE DU FRATOJ BATALAS UNU KONTRAŬ LA ALIA POR LA AMO DE SIA FRATINO.
SI-LEN-TU!
NU, ĈU VI NE DANKOS MIN?!
FRATO, ĈESU!
VI DEVOS ĈESI AMI ŜIN, VIAN FRATINON!
KIU ESTAS LA PATRINO DE MIKA-ELINO?
BRŜŜ
MALBON-REPUTACIA VIRINO, KIU LABORIS EN TA-VERNO. ŜI FLIRTIS DE VIRO AL VIRO.
ALIVORTE, SINJORO GUSTAVO ESTIS DE-LOGITA DE TERURA SIRENO...


RAKONTU AL MI PRI MIA PA TRINO, MI PETAS.
IRU EN LA DOMEGON, ĈU BONE?
NE!
MIKA-ELINO!
LI POVOS DIRI AL VI KIOM FIFAMA ESTIS VIA PATRINO.
SE VI VOLAS EKSCII PLI DA INFORMO, IRU AL HELSINKO. TIE LOĜAS PENTRISTO NOMATA HINDLO.
RAVELIN, JOHANO...
MI PE-TEGAS.
MI NE VOLAS VIDI TIUJN MALĜOJAJN VIZAĜOJN, BONVOLE.


HAHAHA
MI VENKIS!
HAHAHA!
FINFINE MI VENKIS ŜIN!
HA HA, EN ORDO, SED...
NENIO GARANTIAS, KE NIAJ BUŜOJ RESTOS FERMITAJ, ĈU VI KOMPRENAS?
FORIRU, VI DU!
KION DIROS LA VILAĜANOJ KIAM ILI EKSCIOS ĈION ĈI?
SINJORO GUSTAVO ESTIS TRE SERIOZA VIRO, KAJ TAMEN LI...
NU, KION VI VOLAS?
MI NE VOLAS REVIDI VIN ĈI TIE. PAFU VIN FOR!


POR FORIRI, MI NEPRE BEZONUS IOM DA MONO, ĈU NE?
KIOM VI VOLAS, DO?
NU, UNUE MI DEVOS PRIPAROLI TION KUN STEFANINO.
VENU EN LA DOMEGON FRUE POSTTAGMEZE...
MI NE SCIIS, KE MATENAJ SUNRADIOJ POVUS ESTI TIEL HELAJ...
KAJ SAMTEMPE TIEL DOLORIGAJ, KIEL GLAVOJ TRAPIKANTAJ MIN.


KIE ESTAS MIKAELINO?
ŜI RIPOZAS EN SIA DORMOĈAMBRO. VERŜAJNE ŜI ESTAS PLI TRANKVILA NUN.
ĈU VI PLENUMOS LA POSTULON DE BIREO?
JES... MI NE VOLAS, KE ĈIUJ VILAĜANOJ EKSCIU PRI ĈIO ĈI.
SE ILI EKSCIUS, ILI VOLONTE DISVASTIGUS LA KLAĈON TRA LA REGIONO.
MIKAELINO KAJ NIA FORPASINTA PATRO ESTUS SUBMETITAJ AL LA SCIVOLEMAJ RIGARDOJ DE HOMOJ.
TIO ESTUS LA FINO DE LA BONA FAMO DE NIA FAMILIO.
SE LA KLAĈO DISVASTIĜUS, ĜI SEKVUS NIN POR ĈIAM...
SINJORETO JOHANO... BIREO VENIS.
BONE, ENLASU LIN.